V-22378/1946

N

# OFICIALA BULTENO

## DE INTERNACIA ESPERANTO-LIGO.

CENTRA OFICEJO : HERONSGATE, RICKMANSWORTH (HERTS.), ANGLUJO.
(Sendata laŭbezone al la Delegitoj).

N-ro 19 SEPTEMBRO, 1946

Estimataj kolegoj,

La afero bone marŝas, kiel evidentiĝas de la fakto ke ĝis la fino de Aŭgusto ni registris en la nuna jaro 12,380 membrojn, el kiuj 5464 estas Individuaj Membroj. Preskaŭ certe ni atingos 15,000 antaŭ la fino de la jaro. Por la unua plena jaro post la milito tio estas bona, kaj ni kore dankas al ĉiu helpanto.

**Jarlibro 1947.** Tiu estos nia deka, kaj ni tre deziras ke ĝi estu alloga, interesa, kaj utila. Por la unua fojo post 1938 ni sendas Respondilon, por ke vi donu la informon petitan sur ĝi, kaj por ke ni kontrolu ĉiun adreson. Bonvolu resendi ĝin tiel ke ni ricevos ĝin antaŭ la fino de Januaro 1947.

Sed la kosto de ĉiuj presaĵoj terure altiĝis, kaj por eviti altan deficiton ni devas aŭ multe plialtigi kotizojn (kiun ni ne deziras fari) aŭ trovi aliajn enspezojn. Pensu, ke la nuna kosto de *ĉiu paĝo* de la jarlibro estas pli ol 35 svisaj frankoj !

Jen rimedo, kiu estos utila ne nur al ni, sed ankaŭ al la uzanto de la jarlibro. La kosto de reklamo tutpaĝa en la jarlibro 1947 estas donata sur paĝo 3. Se la jarlibro povus enhavi ¼-paĝan reklamon por hotelo en ĉiu grava aŭ vizitinda urbo en la mondo, tio estus tre utila al la vojaĝanto kaj sendube donus kontentigan rezulton al la hotelo, ĉar la eldon-nombro de la jarlibro estos 10,000 kaj ĝi eniras en 59 landojn ; ĉiu scias ke la Esperantistoj estas vojaĝemaj. Do, ni petas ke vi faru vian eblon helpi tiurilate. Notu, ke ni devas ricevi informon pri la pago kaj la tekston antaŭ la fino de Januaro ; agu jam nun kaj sendu tiujn al via pagejo senprokraste. Kompreneble, oni povas ankaŭ sendi ilin rekte al ni, sed *nur* se la pago estas en la sama letero.

**IEL kaj UEA.** Tiuj, kiuj ricevas nian gazeton *Esperanto Internacia* jam scias ke intertraktado pri kunigo de la du organizaĵoj nun okazas. La du komitatoj nun voĉdonas pri la provizora interkonsento, kaj ni rajtas esperi ke la venonta Universala Kongreso en Bern estos ne nur la unua postmilita kongreso, sed ankaŭ la kongreso kiu montros la unuecon de la neŭtrala movado.

**Kotizoj.** Ĝenerale la kotizoj restos samaj por la venonta jaro, kvankam estas malgrandaj ŝanĝoj en kelkaj landoj. Plej ofte ili estas etaj plialtigoj por iom kovri la ĉiam kreskantajn kostojn de la presaĵoj. Estas pli grandaj ŝanĝoj en du-tri landoj pro ŝanĝoj en la kurzoj sed pri tiuj ni ne respondecas ; do, oni ne kulpigu nin!

Aliflanke, ni esperas doni al vi pli bonan kaj pli utilan jarlibron, kaj ankaŭ iom pligrandigi la gazeton ek de Januaro.

Sed jen tre grava punkto. Multaj membroj ne povis ricevi la fruajn numerojn de la gazeto en la nuna jaro, ĉar kiam ni ricevis iliajn kotizojn la numeroj por Januaro ĝis Junio jam tute elĉerpiĝis. Ĉiumonate ni presigis 1500 ekz. pli ol en Decembro 1945, kaj pli ni ne povis riski. Evidentiĝis ke ni ne sufiĉe alte taksis la kreskon de la membraro! Tio povas denove okazi en la venonta jaro, ĉar jam en Januaro ni devas cerbumi kiom presigi por la tuta jaro. Vi helpos al ni solvi tiun problemon per la tre frua pago de via kotizo, kaj samtempe vi ne riskos malkontentigon.

**La Petskribo.** Ĝis nun ni klasifikis 125,000 deklarojn, kaj detaloj pri ili troviĝas en la gazeto. Ili ankoraŭ enfluas bonege, sed ĉu ĉiu delegito faras sian eblon havigi la subskribon de ĉiu konato? Pri tio, ni iom dubas! Daŭrigu la bonan laboron, kaj ni montru al la ekstera mondo ke Esperanto jam havas tiom da subteno ke ne povas esti alia solvo de la lingva problemo.

**Jubilea jaro.** 1947 estas la 60-a jaro de Esperanto. Nia celo estu minimume 20,000 membroj, el kiuj 10,000 individuaj membroj. Varbu viajn Esperantistajn amikojn, kaj ni facile atingos tiujn ciferojn.

CECIL C. GOLDSMITH,
*Sekretario.*


# EPOKO LIBRO N-ro 8

## LA VIRINETO EN BLUO

**KAJ ALIAJ RAKONTOJ**

originale verkitaj en Esperanto
de

**MASON STUTTARD**

Prezo: 3 ŝilingoj, afranko 3p.
(13 internaciaj respondkuponoj).

---

*Eldonita de*

**THE ESPERANTO PUBLISHING CO. Ltd.**
**Anglujo**

*Mendu ĉe*
*via enlanda libroservo*
*aŭ ĉe*

**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO**
**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

# KOTIZOJ 1947

| Lando | MJ | MA | MS | Patr. | Ent. | Jarl. | E.I. | Valuto |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Argentino .. | 3 | 8 | 20 | 80 | 8 | 64 | 6 | pesoj |
| Aŭstralio .. | 4 | 10 | 20 | 100 | 10 | 80 | 7/6 | angl. ŝil. |
| Aŭstrujo .. | 8 | 20 | 40 | 200 | 20 | 160 | 15 | sch. |
| Belgujo .. | 40 | 100 | 200 | 1000 | 100 | 720 | 75 | fr. |
| Brazilo .. | 16 | 40 | 100 | 400 | 40 | 320 | 30 | kru. |
| Britujo .. | 14* | 20* | 35* | 110* | 10 | 80 | 7/6 | ŝil. |
| Bulgarujo .. | .. | 500 | .. | .. | 500 | 4000 | .. | levoj |
| Ĉeĥoslovakujo | 40 | 100 | 200 | 1000 | 100 | 800 | 75 | kĉs. |
| Danujo .. | 4 | 10 | 25 | 100 | 10 | 80 | 7 | kr. |
| Finnlando .. | 110 | 275 | 600 | 2750 | 275 | 2000 | 200 | fmk. |
| Francujo .. | 100 | 240 | 500 | 2400 | 240 | 1920 | 150 | fr. |
| Hispanujo .. | 10 | 22 | 45 | 220 | 22 | 180 | 15 | pes. |
| Hungarujo .. | 10 | 24 | 48 | 240 | 24 | 200 | 16 | for. |
| Irlando .. | 4 | 10 | 25 | 100 | 10 | 80 | 7/6 | ŝil. |
| Italujo .. | 180 | 450 | 900 | 4500 | 450 | 3600 | 300 | lir. |
| Jugoslavujo .. | 40 | 100 | 200 | 1000 | 100 | 800 | 75 | din. |
| Kanado .. | 1 | 2.5 | 5 | 25 | 2.5 | 16 | 1.75 | dol. |
| Nederlando .. | 2.5 | 5.5 | 11 | 55 | 6 | 44 | 3.5 | fl. |
| Norvegujo .. | 4 | 10 | 25 | 100 | 10 | 80 | 7 | kr. |
| Nov-Zelando | 4 | 10 | 20 | 100 | 10 | 80 | 7.6 | angl. ŝil. |
| Palestino .. | 200 | 500 | 1000 | 5000 | 500 | 4000 | 350 | mil. |
| Polujo .. | 100 | 250 | 400 | 2500 | 250 | 1600 | 200 | zl. |
| Portugalujo .. | 20 | 50 | 100 | 500 | 50 | 400 | 40 | esk. |
| Svedujo .. | 3.5 | 9 | 18 | 90 | 10 | 60 | 6.5 | kr. |
| Svisujo .. | 4 | 10 | 20 | 100 | 10 | 72 | 7 | fr. |
| Turkujo .. | 100 | 250 | 600 | 2500 | 250 | 2000 | 175 | pias. |
| Urugvajo .. | 2 | 4 | 9 | 40 | 4 | 32 | 2.5 | pes. |
| Usono .. | 1 | 2.5 | 5 | 25 | 2.5 | 16 | 1.75 | dol. |
| Aliaj landoj .. | 4 | 10 | 20 | 100 | 10 | 80 | 7.5 | angl. ŝil. |

*enhaves la kotizon al B.E.A.

## NOTOJ

**Ĉiu membro** ricevas la membrokarton kaj servokuponaron.

**MJ ricevas** ankaŭ la jarlibron ; Unua Parto en Aprilo, Dua Parto en Oktobro.

**MA, MS, Patrono** ricevas ankaŭ la gazeton *Esperanto Internacia*, sed MS kaj Patrono pagas pli altan kotizon por helpi finance. Ni esperas ke multaj tiel helpos en la venonta jaro por certigi plibonigojn.

**Entrepreno** estas la nomo donita al firmo k.t.p., kiu rajtas presigi en la jarlibron, sub la nomo de la koncerna urbo, anonceton maksimume 40-vortan. Ĝi ricevas ekz. de tiu parto de la jarlibro en kiu aperas la anonceto.

**Jarlibro.** La cifero montrita estas la prezo de tutpaĝa reklamo en la jarlibro. Duon—kaj kvaron—paĝo kostas proporcie.

**E.I.** Tiu kolono indikas la abonprezon de *Esperanto Internacia* por ne-membroj. Ĉiuj abonoj finiĝas en Decembro.

# Muusses Esperanto-Biblioteko

## DENOVE HAVEBLA

1. **La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo.** Julius Glück.
2. **Rusaj noveloj.** M. J. Lermontov kaj D. N. Mamin-Sibirjak. Tradukis A. Filatov.
3. **De Muheddin ĝis Mundilatin.** Verkis Teo Jung. Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj.
4. **Tra Usono kun ruliĝanta hejmo.** Joseph R. Scherer.
5. **El la klasika periodo de Esperanto.** Julius Glück.
6. **La Kongresaj Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof.** Unua parto.
7. **La Kongresaj Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof.** Dua parto.
8. **La Avo.** Aleksandro Petöfi. El la hungara originalo tradukis. L. Spierer.
9. **La Ĵusnaskito.** Ricardo Becerro de Bengoa. El la hispana originalo tradukis J. F. Berenguer.
10. **La Jubilea Kongreso de Esperanto 1912** (Krakovo). Aranĝis kaj kompilis J. Glück.
11. **La Ora Jubilea Kongreso de Esperanto 1937** (Varsovio). Aranĝis kaj kompilis J. Glück.
12. **Nordnordaj Fabeloj.** J. Thézard. Ilustritaj per kvin desegnoj de la aŭtoro.
13. **En la vagono** kaj aliaj rakontoj. Ivan Ŝirjaev.

14-15. **La problemo de Lingvo Internacia.** D-ro Björn Collinder. (Notu : duobla numero kaj duobla prezo)

16. **Rozinjo.** Gyula Török. El la hungara originalo tradukis K. Kalocsay.
17. **El la Londona Skizlibro.** Charles Dickens. El la angla originalo tradukis Fred Wadham.
18. **Flugado Alimonden.** Ernest Dodge.
19. **Patro kaj Filo** kaj aliaj rakontoj. Jordan Jovkov. El la bulgara originalo tradukis Ĥristo Iskrov.

Prezo de ĉiu numero 10 pencoj aŭ 3 respondkuponoj, afrankite.
La tuta kolekto samtempe mendita 12ŝ. 6p., afrankite.

*Mendu ĉe*

**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

LEICESTER CO-OPERATIVE PRINTING SOCIETY LTD.

BIBLIOTEKA ... KUL